



2016-5

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.*

EKO 2016-5 sendita el Budapeŝto la 23an de februaro.

## AMO 15 kreis proponojn kiel grimpi la monton granitan

Tiu seminario okazis en oktobro 2015 en la kulturcentro Greziljono. Nia komuniko EKO 2015-39 resumis la programon. Tiu seminario provis resumi la etapojn por tiu montgrimpado: Informado, Kursstarigo,



Instruado, Utiligo. La seminario plenumis multajn praktikajn ekzercojn, sekve ni havas aron da materialoj – ofte manskribitaj sur grandaj paperfolioj. Grandas la tasko netigi ilin; kion atestas la fakto, ke eĉ la unua tia rezulto bezonis tri monatojn por ricevi atenton. Ni planis sendi ĝin ene de EKO 2016-4, sed trois la aliaj materialoj. Do, jen ĝi nun. Tiu malrapideco sendas klaran signalon – la AMO-programo bezonas signife pli da laborfortoj. Rekone al tio, la buĝeto por Movada Evoluigo en 2016 asignas sumon por AMO-administrado; granda parto de tio celas financi la pli rapidan aperigon de

materialoj. Sed mono estas nur parto de la ekvacio – la alia estas la trovo kaj enŝalto de novaj kapablaj homoj. La rezultoj estas troveblaj en la alĉroĉita PDF-dokumentoj.

## AMO 16 kun prezentaĵoj, aktivigo, forumo kaj taksilo

Kiel planite, la 18-an kaj 19-an de novembro sesis en Havano, la seminario por Aktivula Maturigo kun 25 seminarioj el Kubo plus kelkaj eskterlandaj partoprenantoj.

La temo ‘Sciu la faktojn, forturniĝu de la fantazioj’ estis gvidata de D-ro Orlando Raola. Ĝi traktis la konservadon ekzistantaj kreaĵoj kun la celo prepariĝi al informado pri la vero. Per vigla prezento oni ricevis aktualigitajn argumentojn por la informa laboro. Sekvis grupa laboro.

La dua temo, ‘Kiel fondi kaj organizi novajn lokajn grupojn, gvidi teamon? Kiel flegi vigan kulturan vivon en la asocio?’ estis prezentita de Julián Hernández Angulo kaj Geomar Martínez Pérez. Surbaze de la strategia laborplano de UEA kaj pri labormanieroj por plenumi la celon disvastigi Esperanton kaj produkti novajn esperantistojn, ili emfazis la gravecon teni viglajn la kulturan vivon de la asocio tiel ke la membroj multe pli alproksimiĝu al la kulturaj valoroj de Esperanto kaj konatiĝu kun ĝia historio kaj kulturo.

D-ro Duncan Charters gvidis la temon, ‘Informi kaj varbi: rebati en la praktiko’ kaj donis utilajn rekomendojn kiel prezenti sin publike kaj prepari sin por refuti kontraŭ-argumentojn al Esperanto. La seminarianoj esprimis grandan intereson pri tio.

‘Kiel labori teame: negocado kaj konfliktsolvado’, estis prezentita de Maritza kaj Ariadna Gutiérrez González. Ĝi enhavis konsilojn pri la kulturo de kunlaboro en teamo kaj la diversaj stiloj de negocado por alfronti plej diversajn situaciojn kaj trovi komunajn solvojn al neeviteblaj konfliktoj en la ĉiutaga vivo kaj laboro. Per memtaksilo ĉiu povis iom konatiĝi kun la negocstiloj kaj pri la teama laboro per komunikdinamiko.

La lasta temo, prezentita de Vilhelmo Lutermano, esploris kiel kubanoj povas kontribui al traduka laboro. Li revuis amaskomunikilojn, vikipedion kaj tradukadon de gravaj verkoj. Ekzercoj pri traduka laboro estis plenumitaj cele al instigo pli aktivi pri tradukado.

La seminario sesiis laŭ aktivaj kaj interagaj sesioj kun rolludoj kaj grupa laboro. Okazis du forumoj kaj plenskribo de pritaksa formularo. La forumojn gvidis Norberto Díaz Guevara kun la gvidantoj kaj ebligis resumi la taks-opiniojn. La ĝenerala opinio estis ke la seminario utilis kaj donis multajn sciojn; la seminarianoj montris intereson pri bezonoj ricevi trejnadon pri instrua agado kaj kulturaj temoj. Estis emfazite, ke vera sukceso eblos nur se la seminarianoj multobligos tra la lando la rezultojn de la trejnado.

Koncizigita de raporto de Maritza kaj Ariadna Gutiérrez González el 25-11-2015

## Financoj de AMO

Ĝus kompilita estas la jarkalulo de la AMO-programo tra 2015. Prezento de financoj 2014 kaj 2015 ampleksas nur 215 vortojn. La sumaj elspezoj en 2014 estis €2 818, en 2015 € 2607. Disponigoj en 2014 sumis je € 3079, kaj en 2015 je € 5311 (€3000 el ‘Movada Evoluigo’, € 2000 tre bonvene aljuĝita de Instituto Holder kaj €50 el donaco). Sekve la sumo transigita por 2016 sumas je € 2704. Grava helpo pro seminarioj akceptitaj aŭ antaŭvidataj en Nepalo, Indonezio, Turkio kaj Bunda (Tanzanio).

## Komitata Gvidilo – novaj komitatanoj oficos ekde julio 2016

UEA celas delonge krei serion da gvidiloj pri plej diversaj temoj. Pluraj el la gvidiloj rilatos al oficoj. Plej urĝas estas gvidilo por komitatanoj kaj estraranoj, ĉar ekde julio 2016 ni havos iujn novajn komitatanojn kaj estraranojn. Ili bezonas praktikan dokumenton, por ke ili rapide komprenu la rajtojn kaj devojn de la ofico kaj kiel akiri informojn necesaj por efike agi. La gvidilo celas helpi pli frue ol julio al homoj pripensantaj (aŭ premataj ☺) akcepti oficon.

Foto: la Ĝenerala Direktoro, prezidanto kaj estraranoj en komitata kunsido en 2014.





Foto: de EPĈ: la komitato kunsidas en Bonaero en julio 2014.

Jam ekis la procedo por rekonsistigi la komitaton de UEA. Aliĝintaj Landaj kaj Fakaj Asocioj ricevis alvokon nomumi novajn komitatanojn – ĉu samajn, ĉu novajn. Disiris invito por kandidatigoj por la ses lokoj por B-komitatanoj – se venos pli ol ses kandidatoj, la tuta individua membraro voĉdonos pri ili. La novaj C-komitatanoj estos elektitaj tre frue en la UK. La nuna gvidilo estas alirebla inter la komitataj dokumentoj en la Teko en la retejo de UEA, kune kun Konsilaro kreita de Mark Fettes en 2013. Tamen, ni dissendas la novan gvidilon rekte por pli eksplicite vidigi ĝin.

Niaj gvidiloj estas dinamikaj dokumentoj. Do, ili estas malfermaj al komentoj kaj proponoj. Ni arigos tiujn kaj kiam sufiĉas, ni kros novan version de la gvidilo. Komentoj bonvenaj, laŭeble kun 'GVIDKOM' komence de la retmesaĝo.

Bonan legadon!

Vortoj 927

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Por vidi pli malnovajn komunikadojn iru al: [www.uea.org/vikio/Komunikado\\_kun\\_LA\\_FA...](http://www.uea.org/vikio/Komunikado_kun_LA_FA...)

Alkroĉaĵoj:

Gvidilo por Komitatanoj. 2p. PDF

Ekzercaj rezultoj el AMO 15. PDF

EKO 2016-5 Feb 23 AMO15 KOMGVID.dox

PDF postkreita apr 2016 SMG per Nunace Power PDF